I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

# Informa Bulteno

ESPERANTO

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 3 - 4 Marto kaj Aprilo 1959 9-a Jaro

## AVVISO DEL CASSIERE

Ancora molti dei nostri Soci non hanno versato le quote per il 1959. Non avendo ricevuto avviso di dimissioni abbiamo rinnovato e quindi pagato, alle Associazioni di cui siamo aderenti, le quote per tutti i Soci degli anni scorsi, per cui preghiamo vivamente tutti coloro che ricevono il bollettino di versamento allegato al presente, ad inviare urgentemente la quota, oppure due righe di dimissioni. Le quote sono £. 1150 o £. 550 a seconda che l'affiliazione alla F.E.I. ed U.E.A. avviene tramite la nostra Associazione o direttamente.

Chi riceve il presente Bollettino, e non ha interesse al Movimento Esperantista e non intende riceverlo ulteriormente è pregato di farlo presente alla redazione, Via Donato Creti, 61 Bologna. Grazie anticipate.

## 11-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO

LINZ/Donau (Aŭstrio) 9 - 15 majo 1959 - Adreso: LINZ/D. Bahnhofstrasse, 3

### L A S T A J I N F O R M O J

Glumarkoj: kontraŭ refranko kaj po respondkupono ni sendas folion (10 diverskolorajn glumarkojn). Uzu ilin propagandcele.

Devizoj: Validas la oficialaj devizaj kursoj. En la kongresejo pagu per aŭstra mono.

Kongresejo: Troviĝas en "Kaufmännisches Vereinshaus", angulo Landstrasse-Bismarckstrasse, 10 minutojn de la ĉefstacidomo (piede). Tramhaltejo "Schillerplatz". Ĉiuj kongresaj aranĝoj okazos en la kongresejo.

Ekskursoj: La kotizo por la tuttaga ekskurso estas Ŝil. 50 (inkl. manĝado). Bonvolu pagi ĉe alveno. Ĉe enurbaj ekskursoj la eventualaj aŭtobuskostoj estos enkasataj en la aŭtobuso.

Informoj: En la ĉefstacidomo (alvenhalo) funkcios informangulo sabate la 9-an de majo ekde 5-a horo matene ĝis la 20-a horo vespere. La akceptejo mem troviĝas en la kongresejo. Tie ankaŭ estos informejo.

Tombolo: L.K.K. aranĝos tombolon en la kongresejo, al kiu ni petas ĉiujn kunporti donacojn. Kaj ni petas tiujn, kiuj ne venos al la kongreso sendi ion. Povas esti libroj aŭ specialaĵoj de via lando, kion oni ne trovas en aliaj landoj. Kaj bone atentu ke la profito iros en la kaso de I.F.E.F. sed nur favore al "Internacia Fervojisto". Do memoru: se la donaco estas eta aŭ granda, la redaktoro estas same dankal!

Simpatiantoj: Ĉiu simpatianto, kiu estos paginta la kotizon, ricevos la kongreslibron kaj -insignon.

Infanoj: ĝis aĝo de 14 jaroj ne pagas kongreskotizon (jam pagitaj kotizoj estos rekompencataj).

Aliĝilo: Plenigu ĝin! Nepre indiku sekson kaj aĝon! Se vi havas iajn dezirojn, notu ĝin precise sur la aliĝilo.
Loĝado: La rezervigmono (Ŝil. 50) komprenebIe estos enkalkulata en via pago por via hotelĉambro. Sed se vi pro iu kaŭzo ne partopreni la kongreson, vi ne rajtas repostuli ĝin, ĉar ĝi ankaŭ por ni estos perdita. Se vi mendis unulitan ĉambron kaj ni ne povus plenumi vian deziron pro manko de disponeblaj ĉambroj, bonvolu ne ĉagreniĝi.
Akurateco: Venu akurate al ĉiuj aranĝoj! Vi ege ĉagrenigas la aliajn, se vi malfruiĝas. La aŭtobusoj, trajnoj K.t.p. ekveturas Precise.
Ekskursoj: La biletoj por la diversaj ekskursoj estos eldonataj unu tagon antaŭ la aranĝoj. La horon de la eldonado kaj de la ekveturo al la diversaj fabrikoj vidu sur la nigra tabulo en la antaŭhalo, listo de la ekskursoj troviĝos inter la kongresaĵoj.
Monŝanĝejoj: En la ĉefstacidomo kaj proksime de la kongresejo. Multajn aliajn vi trovas en la urbo. Monŝanĝejo okazos sabate la 9-a de majo inter la 9 - 18 horo en la kongresejo.
Poŝtoficejo kun speciala stampo: Funkcios en la kongresejo dimanĉe antaŭtagmeze kaj lunde ĝis merkrede dumtage. Vidu la planon en la kongreslibro.
Ilustritaj poŝtkartoj: Kun esperanto-teksto estos riceveblaj en la kongresa of.
Kongresa oficejo: Tie vi ricevas ĉiujn informajn, memoraĵojn, glumarkojn ktp. Tie ankaŭ transdonu al ni vian donacon por la tombolo k.t.p.
Vestgardejo: Okazos en la enirhalo. Prezo: Ŝil. 1 (po depono kaj persono).
Kongreskarton: kaj kongreslibron vi ricevos dum aprilo, se vi estas paginta la kongreskotizon.

## 44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio-Pollando JUBILEA ZAMENHOFA JARO 1 - 8 aŭgusto 1959

OFICIALAJ KOMUNIKOJ: N-roj 4-5-6 - Januaro, Februaro kaj marto 1959
Fervoja rabato: La pola Ministerio por Trafiko decidis doni al la kongresanoj 33 %-an fervojan rabaton ek de kaj ĝis la landlimo.
Cseh seminario: De la 29-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1959 okazos en Varsovio, sub la aŭspicoj de la Universala Kongreso de Esperanto, Internacia Seminario por Cseh-metodaj instruistoj, persone gvidata de S-ro Cseh. La Seminario efektiviĝos anfiteatra salono de la Kongresejo (Palaco de la Kulturo kaj Scienco). La kotizo de la Seminario kun atesto pri partopreno estas us.$ 3 aŭ 72 polaj zlotoj.
Diservoj: Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista zorgos Meson en la preĝejo de Nia Savinto en Placo de la Savinto kun prediko en la Internacia Lingvo. Kristana Esperantista Ligo Internacia okazigos protestantan diservon dimanĉe la 2-an de aŭgusto en la preĝejo de la Sankta Triunuo en Varsovio. Intereklezia Ekumenika Movado en Pollando okazigos esperantlingve ekumenikan diservon en la preĝejo ĉe Kredytova str. 2/4.
Libro pri Varsovio: Ĉiu kongresano ricevos donace en la Kongresejo 240-paĝan riĉe ilustritan libron pri Varsovio.
Kongresa Libro: La kongresa programo estos sendata al ĉiu kongresano unu monato antau la komenciĝo de la U.K. La Kongresa Libro ne estos antaŭe sendata.
Revuo "Pollando": Ĉiu kongresano ricevos senpage revuon en Esperanto "Pollando"
Chopin-koncerto: La konata hungara pianisto, Imre Ungar, akceptis la inviton ludi Chopin-koncerton en Ĵelezova Vola, naskiĝurbo de Chopin, okazo de la eksk.
Somera Universitato: Prof.D-ro Giorgio CANUTO, direktoro de la Jurmedicina Instituto en Torino, prelegos pri:"Praktikaj aplikadoj de l'sekva diagnozo en ĉeloj"
Statistiko: (ĝis la fino de februaro) Aliĝis entute 1404 personoj el 38 landoj. (pasintjare 1091 el 31 landoj)

K.K.S.: G.C. Fighiera Prez. de L.K.K. A.Rajski

## STRATO "ESPERANTO" EN ROMO

La Roma Esperantista Grupo ĵus informis nin ke la Komisiono pri Toponimio de la Roma Komunumo unuanime esprimis konsenton por ke unu strato baldaŭ inaŭgurota estu dediĉita al Lingvo Internacia kun la nomo "Esperanto".

Ni varme gratulas la Romajn amikojn pro la brila sukceso.

## "IL LATINO LINGUA INTERNAZIONALE ?"

Tiu ĉi estas la titolo de la interesa itallingva publikaĵo de Prof; Carlo Agostini, eminenta latin-amatoro kaj Pierluigi Marelli Direktoro de I.S.K.E. eldonita de Itala Esperanto Federacio kiel nº 4 de la serio "Dokumentoj".

La 32-paĝa libreto estas plenplena da interesaj notoj kiu faras, de tiu ĉi klopodo, altnivelan sciencan studadon.

Tiu publikaĵo danke al la kompetento kaj seriozeco de la aŭtoroj, fariĝis modela kaj digna verko kiu donos brilon al nia Movado.

## "NOVAJ ESPERANTAJ BROŜUROJ"

SARDINIO: La Memstara Sardinia Regiono-Turisma Aŭtoritato, eldonis du belegajn turismajn prospektojn.

La unua, skribita nur Esperantlingve, titolita "Ferioj en Sardinio", kun multaj kolorbildoj entenas, en 39 paĝoj, la turismajn vojaĝ-planojn por bone viziti la insulon. Ĝi estas dividita en dekkvin vojplanoj.

La dua, trilingva, (Angla, Germana kaj Esperanta) kun belegaj kolorbildoj entenas ĉiujn informojn rilate al Sardinia insulo. Mendeblaj ĉe: Regione Autonoma della Sardegna-Ufficio di Roma, Via Bissolati nº 76 Roma.

HUNGARUJO: La Fremdultrafika, Negoca, Vojaĝa kaj Livera As. de Hungario (Felszabadulàs tèr 5 Budapest V°) eldonis faldprospekton titolitan "Jen estas Hungario" kun belaj fotoj kaj multe da informoj pri Hungario.

GERMANUJO: La Gazetara kajInforma Oficejo de la Germana Federacia Registaro eldonis luksan broŝuron, sub la titolo "Faktoj pri Germanujo" kiu en 72 paĝoj donas ĉiujn informojn pri Germana Politiko, Ekonomio, Kulturo, Sociala vivo k.t.p. La luksa papero, la belegaj koloraj kaj nekoloraj fotoj, la altnivela informa enhavo estas la ĉefaj elementoj pro kiuj la dirita publikaĵo aspektas kiel modelo de la eldona presarto.

Hispanujo:La Esperanto Societo "Frateco" en Zaragoza (Hispanujo-San Vicente de Paul 1°) okaze de la kvindekjara datreveno de sia fondiĝo (1908-1958) eldonis jubilean numeron de la revuo "Nia Vivo" en luksa kovrilo; ĝi en 20 paĝoj, donas al la legantoj informojn pri la historio de tiu Societo, pri ĝiaj fondintoj kaj pri la festeno okaze de la Ora Jubileo de "Frateco".

## ARTIKOLOJ PRI ESPERANTO EN LA GAZETARO

- La fervojista faka gazeto "Voci della Rotaia", piazza della Croce Rossa-Roma, en siaj lastaj du numeroj, en la rubriko "Tutta la Rete" donas informojn pri nia kurso kaj pri nia 11-I.F.E.F.-kongreso en Linz.
- La mondkonata filatelista revuo "Il Collezionista, Italia Filatelica" en sia numero 2 de februaro 1959, publikigas tutpaĝan artikolon, kun fotoj, sub la titolo "La centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof-Esperanto kaj filatelio" de nia eminenta Samideano Adv. Ademaro Barbiellini Amidei.
- La konata filatelista revuo "Il Filatelico" (Casella Postale 176 Catania) en sia numero 12 de decembro 1958 publikigas tutpaĝan artikolon "Filatelio kaj Esperanto" de nia lertega Samideano Adv. Giuseppe Stanislao Boscarino, Regiona Delegito de Esperanto en Sicilio. Li anoncis proksiman gazetaran Esperantan kurson en la Revuo mem.
- La revuo "Gazzetta del Libro" (Roma, Via Campo Marzio, 12), taglibro pri kulturo kaj artoj, en sia 37-a numero de la 14-a de februaro 1959, publikigas dukolonan artikolon "Strato el Ragusa dediĉita al Esperanto".

- La monata gazeto "Il Duemilista" revuo pri junulara vivo, literaturo, arto kaj diversaĵoj, publikigas en la lastaj numeroj artikolojn kaj noticojn pri Esperanto kaj ekkomencos gazetaran esperantan kurson danke al la klopodoj de niaj Samideaninoj T.M. Giovacchini kaj Norma Zacconi (filino de nia Prezidanto Kav.Giuseppe)
- La revuo "Cortina Cocktail" gazeto pri turisma vivo eldonita de la Gazetara Oficejo de A.A.S.T. de Cortina d'Ampezzo en sia 16-a numero de ĵaŭdo la 5-an de marto 1959 publikigas Esperantan artikolon "Alvoko al Cortina" de Prof. Carlo Agostini eksprezidanto de la Bologna Esperanto Grupo.
- En la numero 1-2 de Januaro-Aprilo 1959 de "Wagons Lits" revuo de la samnoma kompanio, dumonata publikaĵo de la Internacia Kompanio de Litvagonoj kaj de la Grandaj Eŭropaj Eksprestrajnoj (Romo, Via Nizza, 128) aperis brila artikolo pri Esperanto sub la titolo "Esperanto il latino della democrazia" de la eminenta kronisto Anton Giulio Fontanive. La digneco de la revuo, la tripaĝa enhavo kaj la multaj kolor-fotoj de la artikolo, donas al ĝi altnivelan valoron.
- En la taggazeto "Carlino Sera" (n°93 de la 22-a de aprilo 1959) aperis kvarkolona artikolo, sub la titolo "Il Gruppo Esperantista Bolognese presente al Congresso di Varsavia" Tiu ĉi artikolo estis verkita por la solenaj manifestacioj je memoro de la naskiĝo de Pola D-ro Zamenhof, ideatoro de la Internacia Lingvo, kaj por atesti la intensan socian kaj lernejan aktivecon.

## NOVAĴOJ DE FINNLANDO

Jarkunveno de Fervojista Esperanto-societo okazis la 30-an de marto 1959 en la fervojista klubĉambro en fervoja stacidomo de Helsinki. La kunveno estas konsiderata unu el la plej gravaj, ĉar tian estis elektata kongres-komitato por la 12-a Internacia Kongreso de Fervojistaj Esperantistoj. Kiel memorate la kongreso okazos en Helsinki en 1960.

## 30-a ITALA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO

FIRENZE - 19 - 24 Septembro 1959

Adreso: Sekretariejo de la 30-a Itala Kongreso de Esperanto Via G.F.Pagnini, 18

La 30-an Italan Kongreson de esperanto gastigos ĉijare, de la 19-a ĝis la 24-a de Septembro, Firenze, la urbo kie en 1910, per la unua nacia kunveno, kiu kreis la Italan Esperanto-Federacion, naskiĝis en nia lando vere organizata Esperanto-movado. La 30-a Kongreso, kiu enkadriĝas en la solenoj kaj laboroj de la Zamenhofa centjaro, havas apartan signifon kaj postulas de ĉiuj italaj esperantistoj zorgajn klopodojn por la sukceso de la manifestado, kiu, pro nombro da aliĝintoj kaj graveco de laboroj, devas trovi vastan resonon ĉe la plej altaj instancoj kaj ĉe la publika opinio, kaj atesti la vivipovecon de nia movado.

La Kongreskotizo estas: ĝis la 31-VII kongresano £.1700 (por F.E.I.-ano 1590) post la 31-VII unika kotizo £.2000. Familianoj, kaj gejunuloj ne pliol 21 jaraj: duonkotizo. Eksterlandanoj kaj blinduloj (I.A.B.E.-anoj) aliĝas senpage.

BALDAU' ALIĜO AL LA KONGRESO, KUN PAGO DE TIES KOTIZO, FACILIGAS LA ORGANIZADON!

## ESPERANTO EN LA RADIO

La Svislanda Nacia Elsendo je Mallongaj Ondoj en Berna dissendas de la 1-a de majo ĝis la 31-a de oktobro 1959 en sia Eŭropa programo, kvar fojojn por semajno Esperantan programon laŭ jena kalendaro:

ĉiuj lundoj je la 18,30 h., kaj ĉiuj mardoj je la 12,50 h., parolis S-ro A. Baur
ĉiuj ĵaudoj je la 12,50 h.kaj ĉiuj vendredoj je la 18,30 h. parolos S-ro Ed.Privat
Ondlongoj: HER 3 metroj 48,66 = 6165 Kc. kaj HER 4 metroj 31,46 = 9535 Kc.

DEZIRAS KORESPONDI KUN ITALAJ GESAMIDEANOJ: F-ino LEHTE LEIB ĉe Familio Sinkel, Ringi, 30 PÄRNU, Estonia (U.R.S.S.) - 20-jaraĝa fraŭlino.

-F-ino FERNANDE TAMMERKÄND-Ilvese, 10-a PÄRNU, Estonia (U.R.S.S.) - 32 jaraĝa